

LA DEKSEPA



Organe Mensuel Espérantiste.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : *France*, 1 franc, — *Etranger*, 1 fr. 50 par an.
Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

Groupe Espérantiste du XVII^e Arrondissement de Paris.

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures,
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.
Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

Nos Diners mensuels.

Les prochains Diners mensuels du Groupe auront lieu
les Mercredis 5 Février et 5 Mars 1913, à 8 heures très
précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.
Prix : 3 fr. 25 (boisson et pourboire compris).

Prochaines Réunions.

- 5 Février. — Monata vespermanĝo sekvata de esper. ludoj.
- 12 Février. — S-ro Robert Bollack : En Aŭstrujo-Hungarujo
(lumbildoj).
- 19 Février. — S-ro L. Chilard : Esperanto kaj Komerco.
- 26 Février. — S-ro Georges Grosset : La ŝufabrikado (lum-
bildoj).
- 5 Mars. — Monata vespermanĝo sekvata de esper. ludoj.

Réunion mensuelle des Groupes Parisiens. — Les membres de la « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa » sont cordialement invités par nos amis du Groupe Espérantiste « Paris-Est », le vendredi 14 Février 1913, à Paris, 1, Place Armand-Carrel (Café des Deux Fiancés), à 9 heures du soir.

Le Secrétaire : ROBERT BOLLACK.

Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa ».

Groupe Espérantiste du XVII^e Arrondissement de Paris.

Le Comité, dans sa séance du 6 Novembre 1913, a désigné à l'unanimité M. Robert Bollack comme délégué du Groupe à l'Assemblée annuelle des délégués de la S. F. P. E. (congrès national français, Toulouse 1913).

Le Comité, dans sa séance du 3 janvier, après avoir pris connaissance d'une lettre de M. le Président de la S. F. P. E. au sujet d'une circulaire de M. le général Sebert pour savoir le nombre des membres qui paieraient la cotisation relative à l'élection des « rajtigitaĵ delegitoj », au neuvième Congrès international d'Esperanto en 1913, a décidé, à l'unanimité, qu'il serait répondu dans le sens suivant à M. le Président de la S. F. P. E. :

Le Groupe ne paiera **aucune cotisation** parce que :

- 1^o Les Congrès internationaux étant des fêtes et non des réunions de Groupes, ne peuvent imposer aucune décision aux Espérantistes. D'ailleurs, le Groupe ne connaît aucune loi espérantiste que la fidélité inébranlable au *Fundamento* ;
- 2^o Le projet de Consortium des Sociétés nationales (entre elles), pouvant rendre des services, annule préalablement toutes les « décisions » des « rajtigitaĵ delegitoj » ;
- 3^o Le Groupe croit remplir **tout son devoir** en soutenant la S. F. P. E. et l'U. E. A., et ne veut pas payer de cotisation dont le montant est inconnu et dont il ne voit pas l'utilité.

Le Secrétaire : ROBERT BOLLACK.



La monato Esperantista.

La 6-an de Novembro okazis en Beauvais propaganda festo en la Komerca Ĉambro. La vicurbestro ĉeestis.

En Toulouse nova kurso de Esperanto en la Supera Unugrada Lernejo.

En Amiens nova propaganda festo okazis la 24-an de Novembro.

En Paris fondiĝis esperantista Grupo de Katalunaj samideanoj loĝantaj en la franca ĉefurbo, sub la titolo : « La Rizamantoj ».

Eksterlande ni citu : En Genève, fondiĝo de nova esp. klubo. Novaj kursoj en Essen a. Ruhr (Germanujo), Ungvár (Hungarujo), Kolomea (Galicio), Bucuresti (Rumanujo).

La estraro de la « Hamburg-Amerika-Linie » permesas, ke oni metu en la legoĉambroj de ĝiaj ŝipoj gazetojn kaj propagandilojn en nia lingvo.

Antaŭ la saksa Parlamento estis proponite la enkonduko de Esperanto en la saksaj popollernejoj.

En Bedales (Anglujo) ekzistas novmetoda Lernejo por la Kunedukado, kie Esperanto estas oficiale enkondukata.

Nova gazeto de Bontemplanoj aperis sub la titolo « La Internacia Abstinenta Observanto » (Redakcio : G. Brockof, Bomlitz, Hannover).

* * *

Pri la gazetaro, ni citos tute interesan artikolon de S-ro Edmond Privat, el *Esperanto*, sub la titolo « Kie ni staras ». Tiu leginda artikolo resumas nian movadon de 1900 ĝis 1908. Jen eltiraĵo :

« Farinte sennombrajn publikajn kursojn kaj paroladojn, la Esperantistoj fine atingis ian malfacilan momenton, kiam la publiko estis iom laca pri ilia propagando kaj ankaŭ pri polemikoj kun teoriuloj, kiuj postulis reformojn....

...Per ĉiuspecaj gravaj signoj anonciĝas vasta sukceso por 1913....

...Nia literaturo nun entute esprimas belan resumon de progresema civilizado ; nia esperantia organizado nun funkciigas mirinde oportunan interhoman komunikadon kaj kunlaboradon ».

En *Lingvo Internacia* Profesoro Th. Cart, opiniante, ke la Esperantistaro bezonas nek « centran direktantan », nek « reprezentantan oficejon », ĉar « la Esperantistaro konsistas nur el tiuj, kiuj uzas la Fundamentan lingvon de D-ro Zamenhof », kaj aliparte, ĉar tamen unu centra Oficejo ekzistas, proponas, ke tiu ĉi iĝu internacia Muzeo Esperantista, kie facile troveblaj estus ĉiuj dokumentoj pri Esperanto.

La *Bulletin Officiel de la S. F. P. E.* proponas interkonsenton de la naciaj Societoj kun U. E. A. Tiu projekto, kiun ni ĉiam de longe aprobis, feliĉe forstrekas la ekzistadon de la rajtigataj delegitoj. La prezidantoj kaj sekretarioj de la naciaj societoj kaj de U. E. A. klopodos inter si por sukcesigi ĉiun aferon rilatante al Esperanto en diversaj landoj. Tiu estraro havos kompreneble nenian lingvan aŭtoritaton.

Kun ĝojo ni legis en *Oficiala Gazeto* la jenan decidon de nia Esperantista Akademio :

« La Akademio,

rimarkinte kun bedaŭro, ke ofte aperas esperantaj verkoj, kiuj enhavas multajn lingvajn erarojn ; ke, pro diversaj kaŭzoj, tiuj verkoj ne estas sufiĉe severe recenzataj de la esperanta gazetaro, kaj ke tiu nesevereco estas trompo por la publiko kaj povas malutili la evoluon de nia lingvo, donante al la publiko malbonajn ekzemplojn ;

rekomendas :

al la gazetaj recenzistoj, ke ili estu pli severaj, kaj ke ili ĉiam zorge notu la lingvajn erarojn, kiujn enhavas la recenzitaj verkoj ;

al la verkistoj, ke ili ĉiam legigu siajn verkojn, antaŭ la eldonado, ĉu de iu kompetenta Lingvokomitato, ĉu de iu kritikista komitato ;

al la Naciaj Societoj, ke ili interkonsentu kun la Naciaj Subkomitatoj de la Lingva Komitato, nun fondataj, por starigi, kiel jam faris la B. E. A., tiujn kritikistajn komitatojn, al kiuj la verkintoj kaj la eldonistoj povos sin turni por esplorigi la publikigotajn verkojn kaj ricevi ian garantion pri ilia lingva korekteco ».

Se tiun vojon oni ĉiam estus sekvinta, kiom da malbono oni estus evitinta al nia kara lingvo !

Nia Akademio, pro ĝia kuraĝa cirkulero, meritas la gratulon de la Fundamentistaro.

ROBERT BOLLACK.

L'Esperanto à Paris et en Banlieue.

Depuis le mois de Janvier, « La Movado » est devenu l'organe officiel de la S. F. P. E. Le journal reste ce qu'il était, et la S. F. P. E. n'est engagée que pour la partie qui contient ses informations officielles.



Le 8 Février 1913, la Section du Quartier Latin organise, comme tous les ans, un Bal de nuit costumé, à 21 h. et quart, dans les Salons Bottallo, 18, rue de la Sorbonne. Il y aura un concours de costumes. Vestiaire, 1 fr.



Le 19 Février 1913, la Section du XIII^e Arrondissement organise une Fête avec le concours de la Zamenhofa Artista Adeptaro, au Café de la Mairie, 71, Avenue des Gobelins.



La Zamenhofa Artista Adeptaro a l'honneur de faire savoir aux Espérantistes que des réunions hebdomadaires ont lieu le mardi soir à 9 heures, à la Brasserie de Valois, 9, rue de Valois (Palais-Royal).



Un groupe d'Espérantistes catalans habitant Paris se réunit tous les samedis soirs à 9 heures, au Café du Départ, Boulevard St-Michel (près le Jardin du Luxembourg). Ce groupement qui se nomme « La Rizamantoj » est présidé par notre ami Fundamentiste J. Solsona. — Tous les Espérantistes y sont cordialement invités.

LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝ-atakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato.

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

ĈE LA KURACISTINO

KOMEDIETO

Personoj : SINJORO TURPIN ; OSKARO FARGEL, lia nevo ;
SINJORINO ALLARD ; FRAŬLINO ROZETO, ŝia
nevino.

SCENO I.

S-RO TURPIN. — Nu! mi ne treege amuziĝas, tie ĉi.
(*Eltirante sian poŝhorloĝon.*) De unu horo kaj kvin minutoj
ni atendas en tiu salono. Mi sufokiĝas. Sufiĉas! Sufiĉegas!
Adiaŭ! (*Li sajnigas eliron.*)

OSKARO. — Onklo mia, ankoraŭ iom da pacienco. La
alveno de tiu Doktoro kredeble ne malfruos pli longe.

S-RO TURPIN. — Mi ne scias plu kion fari ĉi tie. Mi
legis la broŝurojn, mi kalkulis la florojn de la tapiŝo, mi
povus refari la desegnaĵon de la tapeto, tiele mi ilin konas:
unuverte mi uzis ĉiujn distrojn eblajn por homo, kiu atendas
kaj enuas. Mi eliras.

OSKARO. — Sed tio estas neebla.... Vi erariĝos en tiu
Parizo, kiun vi ne konas.

S-RO TURPIN. — Kaj vi estos kulpa. Vi min venigas el
Castelsarrazin, lando kara al mia koro, unue por min viziti-
igi la ĉefurbon, poste por min konduki en diversajn lokojn
amuzajn aŭ interesajn, precipe ĉe la Esperantistojn; kaj vi
juz malsaniĝas, tuj kiam mi alvenas: tio estas idiota!

OSKARO. — Vi mem riproĉas maljuste, onklo mia. Sed
ĉar tio vin devigas resti, mi tamen estas kontenta.

S-RO TURPIN. — Ha! miaj koleroj vin amuzas. Nu! mi
eliras; mi eĉ veturos al Castelsarrazin, lando kara al mia
koro.

OSKARO, *alkroĉiĝante al lia vesto.* — Ho! vi ne min
tiel ĉagrenigos! Ĉar vi estas responda pri mia malsaneto:
vi kondukis min, malgraŭ mi, de kafejo en kafejon. Mi tion
ne kutimas; nu, ĉar mi estis tre varma, mi trinkis glacian
trinkaĵon: kaj de tiu tempo, mi suferas kruelege!

S-RO TURPIN. — Kaj tiu diabla Doktoro, kiu ne alvenas!
Atendu! mi lin ekelnestigos. Li kredeble tagmanĝas ankoraŭ,
jen kial li nin tiel longe atendigas.

OSKARO. — Ne. Ni havu paciencon. Ho! ai! ai! Vi almenaŭ ne suferas!

S-RO TURPIN. — Mi pliamus suferi: tio min okupus!

OSKARO. — Nu! dekroĉu la pentraĵojn, malplenigu la tirkestojn, demetu la kurtenojn, ĉar la mallaboreco vin lacigas.

S-RO TURPIN. — Bona ideo! Jus jen estas ringo, kiu sajnas ne sufiĉe bone alligita. (*Li supreniras sur seĝon, kaj dum li alligas siajn brakojn supren, eniras SINJORINO ALLARD.*)

SCENO II.

S-INO ALLARD, *enirante kun sia ĉapelo kaj siaj gantoj.*
— Sinjoroj (*ŝi salutas*); la vetero estas varmega: kaj feliĉe estas sin trovi en ĉambraro.

S-RO TURPIN. — Senkulpigu min, Sinjorino; sed mia opinio estas tute kontraŭa. Mi forte deziras eliri el tiu ĉambro kaj suriri la straton. Se vi estas paciencema, via pacienco estos baldaŭ provita: ĉar tiu diabla Doktoro nin radikigas tie ĉi.

S-INO ALLARD. — Kiu diabla Doktoro?

OSKARO. — Nu! la mastro de tiu hejmo.

S-INO ALLARD. — Ne estas mastro ĉe tiu hejmo.

S-RO TURPIN. — Ĉe kiu do ni troviĝas?

S-INO ALLARD. — Ĉe mi.

OSKARO. — La malŝanco estas tute plenumita. Ni tie atendas de du horoj: ni sendube konfuzis la etaĝojn.

S-RO TURPIN. — Sinjorino, akceptu miajn petojn por senkulpigo. Mi tre bedaŭras, ke mi tuŝis viajn kurtenojn. Venu, Oskaro.

KONTRAŭ
M A R -
MAL-
SANO

DELPHININE

De l' DOKTORO FLASSCHÆN.

KONTRAŭ
FERVOJ-
MAL-
SANETO

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Aĉetebla ĉe S-ro WEITZ, 8, Rue de Duras, Paris
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.

OSKARO, *sin levante kaj refalante*. — Ha! mi ne povas
S-INO ALLARD, *elprenante lian ĉapelon kaj malbuton-*
umante lian veŝton. — Nu! faru vin senĝena!

OSKARO, *hontema*. — Antaŭ Sinjorino, neniam!

S-INO ALLARD. — Ne ĝenu vin! Mi vidis multajn aliajn!

S-RO TURPIN, *aparte*. — Nu! stranga sinjorino!

S-INO ALLARD, *demandante*. — Kie vi suferas?

OSKARO. — Mi ruĝiĝas, tion montrante. (*Li montras sian ventron*).

S-INO ALLARD. — Kial vi tuj ne diris tion?

S-RO TURPIN. — Ĉar ni trompiĝis pri la etaĝo.

S-INO ALLARD. — Se vi tion forte deziras, vi iros al mia najbaro por lin vidi, kiam mi estos resaniganta tiun ĉi Sinjoron.

S-RO TURPIN. — Vi do estus kapabla?

S-INO ALLARD. — Via rimarko ne estas tre ĝentila, tamen, ŝajnas al mi, ke miaj studadoj povas taŭgi por helpi malsanulejn.

S-RO TURPIN. — Vi do estas tiu malbenita Doktoro! Ho! senkulpigu min, Sinjorino, vi do estas Doktorino!

S-INO ALLARD. — Jes, Sinjoro.



Muzikeldonejo A. BESNARD

26, rue Antoinette, 26 -- PARIS

Esperantia Entrepreno. — Komerca Konsulo de U. E. A.
Konto ĉe Ĉebanko Esperantista.

Specialvendejo de esperantaj gramofonaj diskoj, gramofonoj,
violonoj, mandolinoj, gitaroj, k. t. p.

Komerco kaj eksporto de klasikaj kaj modernaj muzikaĵoj
por ĉiuj muzikiloj, esperantaj kaj ĉiulingvaj kantoj.

SENSACIA NOVAĴO!!! ESPERANTAJ DISKOJ!!!

KANTOJ	}	La Espero	L. L. ZAMENHOF
		Al vi	BEMBERG
DEKLAMOJ	}	Preĝo sub la verda standardo	L. L. ZAMENHOF
		Blanka vualo	V. DEVJATNIN

Ĉiu duobla disko : 4 fr. (1,600 Sm.)

Katalogoj estas sendataj senpage al ĉiuj dezirantoj.

S-RO TURPIN, *aparte*. — Tute strange! Mi vere ne bedaŭras, ke mi forlasis Castelsarrazin'on, lando kara al mia koro.

OSKARO. — Ho! Ho! Tio ne estas plu tolerebla! (*Li svenas*).

S-INO ALLARD, *skribante*. — Rapidu, Sinjoro, alkuru ĉe la farmaciiston; li loĝas du paŝojn de ĉi tie kaj realportu al mi tiun recepton.

S-RO TURPIN. — Espereble, tio ne estas danĝera, kara Doktoro, bona Doktoro? Ne, mi volas diri, estimata Doktorino.

S-INO ALLARD. — Ne, ne; sed eliru rapide kaj revenu ankoraŭ pli rapide.... (*Li eliras.*)

S-INO ALLARD, *enspirigante salojn al OSKARO, vokas*. — Rozeto! Rozeto!

SCENO III.

ROZETO. — Jen, onklino. Kio okazas?

S-INO ALLARD. — Tie estas junulo duone sveninta. Jen okazo por triumfigi viajn famajn magnetismajn teoriojn.

ROZETO. — Ho! kial renovigi niajn malnovajn malkonsentojn? Vi vidas, ke mi faras ĉujn viajn voladojn; ĉar mi nur lernas miajn ekzamenojn pri farmaciarto. Tio estas sufiĉe oficiala, mi pensas.

S-INO ALLARD. — Tiu junulo, tre suferanta, svenis. Lia onklo, kiu lin akompanis, eliris por klopodoj. Nu, elmontru viajn talentojn. Revivigu tiun mortanton.

ROZETO. — Mi nenion faros, tiel longe, kiam vi restos ĉi tie. Ĉar vi estas tro malamika al tiu kuracmaniero.

S-INO ALLARD. — Vi pliamas resti sola kun tiu junulo. Ho! li ne estas danĝera. Nu mi lin forlasas al vi. Je baldaŭ. (*Ŝi eliras.*)

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

SE VI SUFERAS pri la STOMAKO aŭ la INTESTOJ, ne hezitu unu minuton provi la

MAYA BULGARE

Bulgara Lakta Kazeajo, kaj vi neniam plu suferos.

Informoj estas riceveblaj de la Societo

Maya Bulgare, 332, rue St-Honoré, Paris. Téléphone 214-40.

SCENO IV.

ROZETO *faras, antaŭ la vizaĝo de OSKARO,*
gestojn magnetismajn.

S-RO TURPIN, *enirante kun multaj pakajetoj.* — Mi sukokiĝas; mi svitas, mi stertoras; mi supreniris la ŝtupojn kvarope. Prenu, Sinjorino. (*Aparte.*) Ĉu mi ankoraŭ trompiĝis pri la etaĝo? Ĝi ne estas la sama kuracistino. Estas tamen la sama salono: mi rekonas la kurtenojn; fine, ĝi estas la sama nevo, tio estas tute certa. Fraŭlino (*li salutas*). (*Aparte.*) Ŝi estas ĉarma. Se mia nevo ne estus duone mortanta, li ne estus kompatinda.... Ĉu ŝi estas surda? Kion do ŝi faras per tiuj benantaj gestoj. Ho! mia kapo ŝanceliĝas. Kien malaperis la unua Doktorino? Ha! kiam ni estas malsanaj, en Castelsarrazin, lando kara al mia koro, ni iras ĉe la kuraciston kaj tiaj aventuroj ne okazas al ni!... Mi ekinformiĝos ĉe la servistoj. (*Li eliras.*)

SCENO V.

OSKARO, *frotante siajn okulojn.* — Kie mi troviĝas? Ha! mi spiras!... Sed mi min sentas bone, eĉ bonege!! (*Ekvidante ROZETO'n,*) Ho, Fraŭlino, senkulpigu min.

ROZETO. — Ne maltrankviliĝu: vi estas tre deca, kiel malsanulo.... Nun, kiel vi fartas?

OSKARO. — Mi tute resaniĝis. Via ĉeesto, Fraŭlino, kredeble faris tiun miraklon.... Sed kio fariĝis el mia onklo? Li ne konas Parizon kaj li erariĝos.

ROZETO. — Ĵus venis iu sinjoro, kiu parolis pri lando kara al lia koro.

OSKARO. — Certege, estas li! Kiel mi dezirus al li konigi mian resaniĝon.

OUVRAGES de M. Henri de Coppet.

En vente à la Rédaction de « La Dek-Sepa ».

L'Esperanto appris sans maître en 15 leçons	fr. 4,50
Recueil de phrases, édition Française-Esperanto, plus de 2800 phrases de la vie usuelle	fr. 4,80
L'Espero, hymne espérantiste de D-ro L. L. Zamenhof, édition pour tenor ou soprano	fr. 4,50

ROZETO. — Mi tuj lin al vi kondukos. Li kredeble ne estas tre malproksime. (*Ŝi eliras.*)

OSKARO (*sola*). — Kia anĝelo, tiu fraŭlino! Kia ĉarmo en ŝia gesto, ŝia parolo, ŝia irado! Ŝi aperis al mi en dia radiado, kiam mi malfermis la okulojn. Ŝi forgesis tiun skarpon tute sorbigitan de dolĉega parfumo (*Li kisas la skarpon kaj ne vidas S-INO ALLARD, kiu eniras kaj saĝnas tre mirigita.*)

SCENO VI.

S-INO ALLARD. — Nu! Vi fartas tre bone por revivigito.

OSKARO, *konfuza*. — Ho! Sinjorino, mi ne kredis, ke mi estas observita.

S-INO ALLARD. — Mi vidas, ke mia nevino faris miraklon.

OSKARO. — Kiel? Estas fraŭlino via nevino, kiu...

S-INO ALLARD. — Vin magnetizis. Jes, kara sinjoro, mi estas devigata rekoni la kvaliton de ŝiaj fluidaĵoj.

OSKARO, *refarante sian tualeton*. — Ho! kiam mi pensas, ke mi estis tie ĉi, malsprite kuŝanta antaŭ ŝi, kun buŝo sendube malfermata, kun veŝto malbutonumata. Ho! tio estas nepardonebla!

S-INO ALLARD. — Mi certigas, ke ŝi tion ne rimarkis.

OSKARO, *mirante*. — Vi pensas do, ke mi tiom malmulte sin impresis, ke...

(*Daŭrigota.*)

S-INO VALLIENNE.

(*Tradukita de D-RO VALIENNE.*)

La Ondo de Esperanto

Monata
ilustrata
revuo

(fondita en la jaro 1909)

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis SENPAGE romanon de A. Tolstoj: « Princesoj Serebrjanij », kies prezo por ne-abonantoj estas 1 Sm. 600 afr. Nun ĉiu abonanto de la j. 1913, — krom 12 numeroj de la gazeto, senpage ricevos donace belan Esper. libron:

< ORIENTA ALMANAKO >

el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela ktp.

La « Ondo » aperas akurate la 1-an daton, novstilo. Ĉiu n-ro havas 16—24 paĝojn. Formato 17 × 26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda (poŝtk. ilustr.).

Anonco en « Koresp. Fakoj » — 3 respondkuponoj.

La abonpagon (2 rubl. = 2 Sm. 120) oni sendu al « Librejo Esperanto », 26, Tverskaja, Moskva, aŭ al « Presa Esperantista Societo », 33, rue Lacépède, Paris (kiu vendas ankaŭ po numero, 15 Sd., afrankite 20 Sd.) poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpagilo de Esper. ĉekbanko.



Vera
 Ferhava Salo
 alsimiligobla
 ELTROVITA DE
 M. Maurice ROBIN
 en 1881

LA
Fer Robin

mirinde efikas
 KONTRAŬ
 SENSANGECO,
 PALKOLORECO,
 SANGELFLUOJ
 ĈIUSPECAJ

Akcelas la nutradon kaj
 neniam mallaksigas.

Tiu ĉi kuracilo, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ce ĉiu mango, ĉu en londa akvo aŭ vino. La enhavo de la boteleto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn
 POSTULU la ROBIN
 nomon de

VENDEJO POGRANDE:
 13, Rue de Poissy, PARIS